

Osijeka Sonorilo

magazino de osijekaj esperantistoj

1
2008

EN TIU ĈI NUMERO:

Sensacio!

*Marija Pilepić - la unua kroata esperantisto el 1889:
Trovitaj la domo (Osijek), foto (Sarajevo)
kaj tombo (Opatija)!*

La urbo Osijek - historio kaj nuntempo

Historio de Esperanto en Osijek

Osijeka Kvinopo el 1889 - la unuaj esperantistoj en Kroatio

Osijekaj esperantaj vortaroj

La plej maljuna osijeka esperantisto

OSJEČKO ZVONO - časopis osječkih esperantista

VORTO DE LA REDAKTORO

Aperis la unua numero de nia osijeka esperanta magazino.

Osijek havas longan esperantan historion, sed delonge ne aperis en ĝi esperanta gazeto nek magazino. Pro tio multaj eventoj kaj multaj rezultoj ne estis konvene notitaj. Ĉi tiuj paĝoj prezentos ilin al la esperanta publiko kaj eble savos ilin kontraŭ forgeso.

Samtempe la gazeto prezentos al kroataj kaj eksterlandaj esperantistoj la urbon Osijek, urbon belan, kun riĉa kulturo kaj historio. Ankaŭ novaĵoj el la esperanta mondo aperos ĉi tie, sed prefere tiuj, en kiuj partoprenis esperantistoj el Osijek.

Ĝenerale la kunlaborantoj estos lokaj esperantistoj, nuntempaj aŭ iamaj, sed ankaŭ bonvena estas kunlaboro de neosijekanoj kaj neesperantistoj, se iliaj tekstoj iel rilatas al osijeka esperanta movado kaj al kultura valoro de nia urbo.

Kvankam hodiaŭ eldonado de gazetoj kaj libroj ne plu estas tiom multekosta kaj komplika, kiom en pasintaj tempoj, tamen ĝi ankoraŭ estas laboro nek facila nek malgranda. Sed nia laboro havos sufiĉan rekompencan, se esperantistoj legos ĝin kun intereso. Espereble eĉ post 30 aŭ 50 jaroj iuj esperantistoj ie legos Sonorilon kun ĝuo, kaj estos dankemaj al tiuj, kiuj ĝin faris.

Eldonis:

Esperantsko društvo
"Liberiga Stelo" Osijek,
p.p. 27, HR-31000 Osijek,
Kroatio

Redaktis:

Davor Klobuĉar

Presis:

Grafokom d.d. Đurđevac,
grafokom@kc.t-com.hr

Grafike aranĝis:

Josip Pleadin

Kontribuis:

Višnja Branković,
Danijela Drakula, Marija Franz,
Davor Klobuĉar,
Aleksandar Kocian,
Damir Malkoĉ, Josip Pleadin,
Vlado Stipanović,
Nikola Vidić

Aperis:

novembro 2008

La titolbildo:

Fontano en la ĉefa placo
de Osijek

SENSACIO!



Marija Pilepić (1871 - 1962)
(la foto el ĉ.1923, Sarajevo)

MARIJA PILEPIĆ - LA UNUA KROATA ESPERANTISTO (EL 1889)

Post 2 jaroj da esplora laboro (2007-2008),
Davor Klobuĉar venis, interalie, al la sekvaj fotoj:



Ŝia tombo en Opatija, nun sub protekto de la
urbo Opatija kaj Esperanto-societo Rijeka

Legu detale en la artikolo "Osijeka Kvinopo el 1889" en la paĝo 9.

Osijek, la urbo en nordorienta Kroatio, estas administra, ekonomia, komerca kaj universitata centro de la regiono Slavonio. Ĝi situas en Panonia

Ebenaĵo, sur la tereno tute plata. La urbo algluiĝis al la rivero Drava, sekvante ĝian fluon 10 km laŭ la suda bordo. Kaj transe, norde, estas nur malmultaj domoj. Tial okazas, ke nur 100-300 metrojn for de la urbocentro jam estas kampoj kaj arbaretoj! Havante 114 mil loĝantojn (2001), ĝi estas la kvara granda urbo en Kroatio (post Zagreb, Split kaj Rijeka). Nacia strukturo en 2001 estis jena: 86.5% kroatoj, 7.6% serboj, 1% hungaroj kaj pluraj popoloj malpli od 1%. Religie estis 84.2% romkatolikoj, 7.5% ortodoksaj, 0.8% mahometanoj, 2.5% ateistoj ktp. Tradicie Osijek havis 3 partojn: Fortikaĵo (Tvrđa), Supra Urbo (Gornji grad) kaj Malsupra Urbo (Donji grad). Sed la urbo kreskis, kaj aperis aŭ kunligiĝis, ankaŭ Retfala kaj Nova urbo (Novi grad). En la 20a jarcento konstruiĝis novaj partoj: Sjenjak, Jug ktp.

Antaŭ ol paroli pri la historio, mi mencias diversajn interesaĵojn, sen speciala ordo.

Osijek havas tramojn, la sola en Kroatio krom Zagreb. La urbo estas plenplena de arboj kaj verdaĵo, neniu alia kroata urbo kompareblas. Se vi vizitas ĝin, precipe en majo kaj junio, vi povas senti, ke vi estas ne en urbo, sed en arbaro! La ĉefa placo havas formon triangulan, kio estas rara en la mondo. Sur la placo estas granda fontano, kie akvo leviĝas vertikale el la planko el multaj lokoj. Sed kurioze, la fontano ne estas limigita per iu barilo, la akvo do faras liberan makulon sur la pavimo. Kaj estas pluraj skulpturoj en la urbo, iom nekutimaj, kiuj prezentas famajn homojn kun stranga elekto, ekz. Pablo Picasso, August Cesarec ktp. Osijek vivas en firma brakumo kun sia rivero. Estas tie urba plaĝo kun la pompa brazila nomo Copacabana. Blanka ponto super Drava, destinita al piedirantoj, estas plena de amdeklaroj, skribitaj sur la asfalto per koloraj kretoj. Tiuj mesaĝoj kompreneble paliĝas kaj malaperas, sed ĉiam venas la novaj! Kaj foje aperas eĉ plurmetraj literoj sur digo de Drava, kutime kun ia virina nomo kaj la originala mesaĝo "Mi amas vin". Se en frua vespero en la centro vi promenas apud Drava, vi sentos, ke tie renkonteblas preskaŭ ĉiu osijekano! Vi vidos fiŝkaptantojn, remantajn sportistojn ktp. Kaj kiu urbo, krom Osijek, havas ĉiujare kelkajn tagojn da "malfermita teatro", kiam en la ĉefan teatron povas senpage veni iu ajn, kondiĉe ke aliaj homoj ne venis pli frue kaj okupis la seĝojn? Kiu urbo sian militan

LA HISTORIO KAJ NUNTEMPO URBO OSIJEK

mur-grafiton "Osijek - nekonkerebla urbo" konsideras tiom valora, ke oni renovigis tiun muron (cetere kadukan kaj senvaloran), farbinte ĝin zorge, por ne difekti la originalan skribaĵon? Se vi tamen volas esti malkontenta pri Osijek, mi helpos vin per la ideoj: somere vespere atakos vin kuloj freneze, printempe kaj somere vin eble turmentos polena alergio, speciale tiu de ambrosio. En la akvo vi malkovros sufiĉe da kalcia karbonato. Post longa restado vi eble pensos, ke la urbo estas geografie sufiĉe for de ĉio interesa. Kaj ke en Zagreb kaj aliloke estas pli da laboro kaj profito. Jes, ankaŭ osijekanoj foje konkludas tion. Sed multaj neniam forlasos ĉi urbon, kiu per sia beleco tiom fascinas vizitantojn, ĉi urbon de bonkoraj kaj simplaj homoj, kiuj abundan manĝaĵon konsideras grava en la vivo, speciale tiun "kulen", "fiŝ-paprikaŝ" kaj "ĉobanac".

Antaŭ 2.000 jaroj ĉi tie vivis iliroj kaj keltoj. Jam tiam ekzistis la vilaĝo Mursa, kies nomo verŝajne rilatis al (tiam) proksimaj marĉoj. En la 1-a jarcento la regionon konkeris romianoj,



*Moderna ponto por
piedirantoj*

kaj la imperiestro Hadriano en 124 donis al Mursa la altan rangon de urbo-kolonio. Apud Mursa pasis ankaŭ la romia "limes", la ŝoseo sekvanta ŝtatan limon kaj la riveron Danubo. En 351 okazis granda kaj tre sanga batalo inter du konkurencaj romiaj imperiestroj. Sed Mursa ne plu vivis longe. Fine de la sama jarcento ĝin bruligis vizigotaj barbaroj, kaj en 441 hunoj detruis ĝin definitive. Restaĵoj de Mursa estas troveblaj preskaŭ ĉie sub grundo de Malsupra Urbo. Homoj ofte timas ke, ekkonstruinte propran familian domon en Malsupra Urbo ili trovos ion similan kaj poste devos longe atendi, ke arkeologoj finu sian laboron!

La regionon en la 10a jarcento regis kroatoj, kaj en la 12a hungaroj. Aŭ pli precize, hungara dinastio kaj kroata nobelaro. Kaj la loĝantaro, ĉefe slava, formis iam iaspecan urbeton (la mezepoka Osijek) 2 km okcidente de la ruinoj de iama Mursa. Oni nur scias, kaj hodiaŭ prifestas, la unuan historian mension de la urba nomo. Ĉar en 1196 la hungara-kroata reĝo Emerik la 1-a en iu dokumento konfirmis ies rajton preni certajn impostojn ĉe Osijek - en tiu dokumento hungare "Eszek".

Kaj Mursa, kaj la mezepoka urbo Osijek, fondiĝis apud Drava sur lokoj relative altaj, por eviti superakvon. Ĉar tia tereno estas pli seka, kiel ĉe malalta tajdo (kroate "oseka"), tre verŝajne tial la urbo ricevis la nomon Osek aŭ Osijek (poste hungare Eszek kaj germane Essegg).

Inter 1196 kaj 1526 ekzistis malgranda mezepoka Osijek. Ĝiaj feŭdismaj posedantoj estis pluraj katolikaj monaĥejoj kaj episkopoj, sed la urbo pleje prosperis dum regado de la nobelula familio Koroĝ (kroate Kružić). Ĉar apud Osijek estis tre taŭga loko por prame transiri Drava-n, oni pagigis la transiron al vojaĝantoj kaj komercistoj. Tio estis fonto de granda profito, pri kiu rajto ofte tribunale batalis la familio



Kroata nacia teatro en Osijek

Koroĝ kaj la eklezio. Sed la familio Koroĝ formortis en la 15a jarcento, post kio la historio iomete malklaras.

En la jaro 1521 la armeo de otomana Turkio konkeris Beograd-on kaj baldaŭ proksimiĝis al Osijek. La urbanoj tuj rezignis pri la defendo kaj sendis delegitojn, kiuj rekonis la turkan regadon kaj simbole transdonis ŝlosilojn de la urbo. Post unu semajno granda turka armeo transiris Drava-n ĉe Osijek kaj foriris al siaj pluaj celoj en Hungario. Iuj historiaj fontoj diras, ke la turkoj tiam plene detruis la urbon. Eble por ne havi malamikon malantaŭ la dorso, aŭ por malhelpi, ke la propraj soldatoj fuĝu returnen? Eble la fajro aperis hazarde kaj eĉ ne estis fatala? Oni ne scias. Sed el la mezepoka antaŭturka urvo Osijek restis hodiaŭ nenio. Samkiel restis nenio el Mursa, almenaŭ ne super la grundo...

Nun sekvas 150-jara historio de turka Osijek. Ĉar ĝia pozicio estis strategie tre grava, la turka sultano baldaŭ decidis rekonstrui la urbon kaj la muregojn. Tio gravis, ĉar jam en 1537 aŭstroj provis rekonkeri la urbon. Poste en la sama 16a jarcento venis pluraj kristanaj komercistoj kaj diplomatoj al Osijek, kaj skribis, ke ĝi aspektas kaduka, malpura, ĉirkaŭata per marĉoj kaj suferanta pro malario. Sed en la 17a jarcento la raportoj jam estas pli favoraj. La fama turka vojaĝanto Evli Ĉelebi skribis, ke Osijek havis en 1663 fortikaĵon apud Drava, kun fortegaj muroj kaj turka milita muziko somere. Ĉirkaŭe estis la meza urbo, kvadratforma kun pluraj moskeoj, multaj metiistoj kaj komercistoj, religiaj kaj civilaj lernejoj, publikaj akvofontoj ktp. Tie vivis nur mahometanoj. Ĝi ankaŭ estis ĉirkaŭita

per (aliaj) muregoj. Tiuj du partoj egalas pli-malpli al la hodiaŭa Tvrđa. Ekstere estis antaŭurbo kaj foirejo. La urbo havis gravan rolon en la regiono. La 50.000 loĝantoj estis plimulte mahometanoj. Elstaris du konstruaĵoj: la Moskeo de Kasim-paŝao kun granda minareto kaj la fama Osijeka Ponto.

La ponto estis miraklo de la konstru-arto en tiama Eŭropo. Longa 6 km, el lignaj trunkoj, super Drava kaj plu norden super marĉoj ĝis Darda, sufiĉe larĝa por ke du ĉaroj povu preteriri unu la alian. Jen ĝia historio: la fama turka sultano Sulejmano la Granda en 1529



Osijeka katedralo kaj ĉefplaca fontano

iris kun granda armeo kontraŭ Vienon. Ĉe Osijek ili devis transpasi Drava-n. La loka reganto Hamza-bejo devis fari la ponton antaŭe. Sed la rivero estis tre sovaĝa kaj sekve la konstruado ĉiam fiaskis, kion la bejo mesaĝis al la sultano. La sultano remesaĝis minace, ke li pendigos la bejon sur la ponto, se la laboro ne estos finfarita ĉe lia alveno. La bejo panike mobilizis ĉiun laborkapablan homon (25.000 da ili), kaj la ponto estis finfarita en 10 tagoj! Post 40 jaroj turkoj rekonstruis kaj fortigis la ponton. Kristana Eŭropo admiris ĝin ("il famoso ponte d'Essek"), sed ankaŭ timis ĝin, ĉar trans ĝi turkoj ofte iris al danĝeraj milikampanjoj kontraŭ eŭropaj ŝtatoj.

En la 17a jarcento oftis bataloj inter Turkio kaj Aŭstrio. Menciindas, ke en 1664 la kroata banuso (subreĝo) Nikola Zrinski kun eta armeo surprize transiris turkan limon, atingis post pli ol 100 km la urbon Osijek, bruligis la ponton kaj rapide retiriĝis. Tiu ago tiom entuziasmigis Eŭropon, ke en la aŭstria urbo Graz sur la ĉefa placo oni metis skulpturon kun la teksto "Ponte ad Ossecum successo tardantur Turcae. Nec deinde proximi nocent (1664)". Sed turkoj riparigis la ponton jam post 3-4 monatoj. En 1683 komenciĝis granda ofensivo de Aŭstrio, Pollando kaj Venecio, kaj post 16-jara milito liberiĝis disde turkoj ankaŭ Osijek, precize en 1687. Sed Francio surprize atakis Aŭstrion, kion turkoj profitis kaj reatakis Osijekon en 1690, celante eĉ Hungarion. La defendantoj de Osijek estis jam senesperaj. Tiam ilia komandanto uzis trukon. Li sekrete sendis armeajn trompetistojn kaj tamburistojn for el la urbo, kun ordono, ke ili faru kiom eble plej grandan bruon. Aŭdinte la bruon, turkoj ektimis, ke venas granda aŭstria armeo por helpi al Osijek. Ili tuj retiriĝis kaj Osijek estis savita. Neniom plu turkoj proksimiĝis. Tiel en la 18a jarcento la urbo denove estis en la kristana Eŭropo, Slavonio kaj Kroatio. Sed dum la milito ĝi ankaŭ serioze detruigis. Post renovigo, el la turka urbo restis hodiaŭ nur 3-metrojn longa kaj unu metron alta simpla brika muro - iam parto de urba murego.

Ĉar la turkoj estis daŭra minaco, Aŭstrio komprenis, ke necesas el Osijek fari bazon por defendi sian sudan limon. Inter 1712 kaj 1719 la armeo konstruis tre grandan kaj ampleksan fortikaĵon, kiu entenis la lokon de la mezepoka kaj turka Osijek. La muregoj ĉirkaŭiris la urbon du fojojn, eble eĉ tri, depende de la interpretado. Konstruiĝis ankaŭ pluraj grandaj domoj por armeo kaj registaro. Elstaras la granda Ĉefkomandejo. Tiam revenis la vivo al la hodiaŭa Tvrđa, kiu longe restis administra centro de la

nova Osijek. Por liberigi spacon por la muregoj, oni translokiĝis la civilojn, kiuj vivis apude. Tiel fondiĝis Supra Urbo, 2 km okcidente. Ĉirkau 1700 aperis 2 km oriente ankaŭ Malsupra Urbo. La loĝantaro en 1702 estis tia: 54% kroatoj, 30% germanoj, 4.6% hungaroj, 3.5% ĉeĥoj, sed interese: 1.5% italoj kaj 1.1% francoj! Kroatoj plimultis en Supra Urbo kaj iom en Malsupra Urbo, germanoj en Tvrđa. Ortodoksaj kristanoj (posta serba minoritato) aperis nur poste, iom post iom venante el najbaraj landoj. Ili rajtis loĝi nur en Malsupra Urbo.

Kvankam konsiderataj partoj de Osijek, la 3 urbopartoj estis apartaj komunumoj, kiuj ne volis unuiĝi. Eĉ poste ili volis, sed ne estis konsento pri la rajto kiu organizu foirojn kaj prenu monon el lokaj impostoj. Tial la aŭstria imperiestro Jozefo la 2a simple sendis ordonon, ke ili tuj unuiĝu. La ordono alvenis en 1786, la 2an de decembro (hodiaŭ la urba festotago). Post tia instigo sufiĉis nur kelkaj tagoj, por ke la urbanoj efektiviĝu la unuiĝon.

Sed la feŭdisma mastro de la urbo estis la ŝtata kamero de Aŭstrio en Vieno. Osijek, kiu post la liberiĝo pleniĝis per nova (kristana) loĝantaro, inter kiu estis multaj metiistoj, jam sufiĉe riĉiĝis, kaj deziris esti t.n. libera reĝa urbo. Tiu titolo signifis en feŭdismo, ke la urbanoj mem regu sian urbon, havu pli da politikaj rajtoj kaj pli da mono. Sed tion akiri eblis nur en specialaj okazoj. Kaj ĝuste komence de la 19a jarcento estis pluraj militoj inter Francio kaj Aŭstrio, malvenkaj por Aŭstrio. Tie Osijek multe helpis al la kortego, eĉ la tuta imperiestra trezorejo estis transportita al Osijek, por ke francoj ne kaptu ĝin en Vieno! Kaj finfine, paginte enorman sumon, Osijek en 1809 ricevis la ĉarton, kiu donas la rajton esti libera kaj reĝa urbo. Tial la 28an de aŭgusto 1809 estis grandioza festo en Osijek: solena meso, solena magistrata kunsido, senpaga bakita bovviando por la tuta loĝantaro, solena balo, lumdekoracio de oficialaj domoj. Solena ĵuro estis eldirita de la urbanoj kroate kaj germane.

Komence de la 19a jarcento Osijek havis pli da loĝantoj ol Zagreb aŭ Rijeka! Sed unue ĝi prosperis tre malrapide. Necesis ja elpagi plene la prezon de la novaj rajtoj! Kaj krome,

Turkio estis ĉiam pli malforta, sekve Osijek malpli grava strategie. En 1848 naciismaj ribelantoj el Hungario prenis sen batalo la fortikaĵon de Osijek, sed la kroata banuso Jelačić poste, same sen grava batalo reprenis ĝin. Osijekanoj ŝajne restis sufiĉe indiferentaj, kaj al la hungara kaj al la kroata naciismo. Kvankam kroatoj estis en plimulto, tamen en la politiko, ekonomio kaj kulturo ĉefis la germana elemento. Sed ĉio ŝanĝiĝis fine de la 19a jarcento. La kroata kulturo kaj influo konstante kreskis. Krome, en

kaj modernan hospitalon en ĉi parto de Eŭropo (1874), kaj amason da aliaj industriaj kaj teknikaj novaĵoj, amason da kulturaj, fakaj kaj hobiaj organizaĵoj - estante per ĉio ĉi vera grandurbo. Post 1900 aperis multaj grandaj domoj de riĉaj urbanoj, kaj speciale tiu "secesia" serio de domoj kun belegaj fasadoj en Eŭropa avenuo.

Post la 1a mondomilito la urbo estis en nova sudslava ŝtato, kiu baldaŭ ricevis la nomon Jugoslavio, en kiu serboj havis videblan superregon, speciale super kroatoj. Osijek ankoraŭ iom evoluis, sed jam ne tiom rapide, kiom aliaj urboj. Krome ĝi ne plu estis en centro de iu granda ŝtato, sed estis preskaŭ apudlima urbo. La urba estraro decidis plene malkonstrui la muregojn de Tvrđa, ĉar ili, laŭdire, ĝenis pluan evoluon de la moderna urbo. Tio efektiviĝis inter 1923 kaj 1926, restis nur tre malgranda parto. Tio estas tre bedaŭrinda, ĉar la muregoj povis esti unuaranga turisma vidindaĵo. Kaj Osijek povis esti tutmonde konata kiel "kontinenta Dubrovnik".

Post la mondomilito ŝanĝiĝis la loĝantaro. Malaperis la germanoj - parte pro asimiliĝo, aŭ foriris mem antaŭ la fino de la 2a mondomilito, aŭ estis forpelitaj tuj post ĝi. La urbo devis esti socialisma modelo, sed ankaŭ jugoslavia, tial ĝi denove evoluis kiel industria centro post 1945. Sed en 1991 la kroata popolo volis eliri el Jugoslavio kaj havi finfine propran ŝtaton. Tion ne permesis Serbio kaj la armeo regata ĉefe de serboj. Ili eĉ ribeligis serbojn loĝantajn en

Kroatio. (Favorataj en Jugoslavio, multaj serboj antaŭe venis al Osijek, sed post la nesukcesa ribelo multaj ankaŭ forlasis ĝin.) Neniam tiu armeo trovis sufiĉan forton por eniri en Osijek, sed dum multaj monatoj pafis grenadojn kontraŭ la urbon, farante grandan damaĝon kaj viktimojn. La milito ĉesis, sed la urbo malprosperis kaj la senlaboreco kreskis, parte pro la milito, parte pro perdo de jugoslaviaj kaj orienteŭropaj merkatoj, sed parte ankaŭ pro la nova politika sistemo. Venis ne nur demokratio, sed ankaŭ sovaĝa kapitalismo t.e. senskrupulaj interesoj de novaj kroataj riĉuloj kaj politikistoj. Sed ŝajnas, ke la cirkonstancoj jam pliboniĝas.

Davor Klobučar □



Tvrđa - la plej malnova parto de Osijek

Osijek multe evoluis industrio, komerco kaj financoj. En 1869 ankaŭ la fervojo venis al Osijek, kvankam nur kiel ligo al la hungaria fervoja reto. Se vi volis veturi trajne de Osijek al Zagreb, vi devis iri norden al Hungario kaj dufoje ŝanĝi trajnon kaj dufoje transiri Drava-n! Tamen Osijek havis en 1900 nur iomete malpli da loĝantoj ol Zagreb. Sed ĉar la natura kresko ne estis granda, tiuj loĝantoj ofte estis venintaj el aliaj lokoj kaj landoj. Sekve Osijek estis iaspeca kosmopolita urbo.

Osijek havis la unuan ĉevaltramon en sudorienta Eŭropo, la vaporan muelejon, kiu konkurencis al tiuj budapeŝtaj, Kroatan nacian teatron jam en 1866, la unuan (eĉ privatan) vaporŝipan kompanion en Eŭropo, la plej grandan

HISTORIO DE LA ESPERANTA MOVADO EN OSIJEK

(Skribita laŭ la libro "Novaj perspektivoj" de Antun Šimunić. Rimarko redaktora: se ni ne forgesis la malnovan osijekan esperantan historion, tion ni devas danki ĉefe al la forpasinta profesoro Antun Šimunić!)

Historio de la movado en Osijek komenciĝas jam en la jaro 1889. En la adresaro de Zamenhof el tiu jaro troviĝas 5 personoj el Osijek: Natalija Hergović, Anna Hradil, Emmy Hradil, Gusti Hradil kaj Marija Magd. Pillepich. Tamen, en la libro de Adam Zakrzewski "Historio de Esperanto 1887-1912" eldonita en Varsovio en 1913 estas informo, ke en Kroatio en la jaro 1889 estas kvin esperantistoj. En la 12-a adresaro aperas la nomo de ankoraŭ unu osijekano: Mosche Egon.

Kvankam la unua ariĝo de la osijekaj esperantistoj okazis en la 1909 kaj poste, unuan esperantistan unuigon ni trovas en la jaro 1922 aŭ 1923 (pri kiu oni tamen scias nenion). Esperantistoj en tiu tempo kunlaboras kun Klubo de osijekaj literaturistoj (posta nomo: Klubo de kroataj literaturistoj kaj artistoj).

En la jaro 1926 estis fondita esperanto societo "Obstine antaŭen". Por la fondiĝo la plej merita estis Milan Klem, pioniro de la esperanta movado en la urbo. Li kaŝe gvidis kursojn de la lingvo. La societo ne havis siajn ejojn kaj kunvenoj okazadis en trinkejoj. Finfine en la jaro 1929 la societo ricevis ejojn en la lernejo "Jäger" (hodiaŭa Pedagogia fakultato). Prezidanto de la societo tiutempe estis Dragutin Wranka kaj sekretario Zora Prehl.

Novaj ejoj en Komerca domo (Ŝkolska strato) ebligis pli aktivan esperantan vivon: solenajn aranĝojn okaze de esperantaj datrevenoj, prelegojn (Kola Ayayi kaj aliaj),

ekspoziciojn, koncertojn ktp. Dragutin Wranka komencas instrui Esperanton per la tiam tre nova Cseh-metodo. La prezidanto de la societo en tiu tempo estis Lavoslav Kraus kaj la sekretario Ladislav Firicki. En la programo partoprenis junaj kaj maljunaj membroj: Dragutin Wranka, Vilibald Premuž, fino Rupnik, Ladislav Firicki, Viktor Magdić (orkestra estro en la kantista societo "Kuhač"), Vladimir Poznić, Maja Foller, Jelka Vojvodić. Kontribuis al la movado ankaŭ gravaj personoj de la urbo: d-ro Čačinović, Josip Hartl, direktoro de "Hrvatski list" (Kroata gazeto) kaj aliaj.

Ni povas konstati, ke la kontribuo de "Obstine antaŭen" en la movado en Kroatio (kaj ankaŭ en tiama Jugoslavio) estis tre granda. Ni menciuj, ke Lavoslav Kraus kaj Dragutin Wranka estas aŭtoroj de la vortaro "4000 vortoj", Ankaŭ menciindas, ke en Osijek en la jaro 1935 okazis la 8-a kongreso de jugoslavaj esperantistoj. Dum la kongreso la partoprenantoj povis ĝui riĉan kulturartan programon: la osijekaj filharmonio (dirigento Lav Mirski), la osijekaj miksitaj korusoj kaj pluraj muzikaj artistoj el Osijek kaj aliaj urboj.

Pri la fondiĝo de la societo "Verda Stelo" oni ne scias multe. Ĝi okazis verŝajne inter 1930 kaj 1932. Ŝajnas, ke la societon fondis iuj membroj de "Obstine antaŭen". En la jaro 1934. la prezidanto de la societo estis Matija Gotta. En lia loĝejo ekzercis miksitaj Esperanta korusoj: Ivan Mikš, inĝ. Kornelije Klein, Slava Wranka kaj aliaj. La kursojn de Esperanto gvidis Gotta, Haubrich kaj Firicki. La societo



Anoj de la osijekano societo "Obstine antaŭen" en 1935

verŝajne dum certa periodo ĉesis aktivadi ĉar en la jaro 1936 estis fondita la Esperanto societo "Verda Stelo". La prezidanto de la societo estis Ladislav Firicki, vicprezidanto Zvonimir Kliment, sekretario Franjo Inself, kasistino Evica Mađar kaj bibliotekistino Marci Sekulić.

La ambaŭ societoj ("Obstine antaŭen" kaj "Verda Stelo") aktivis ĝis la komenco de la dua mondmilito.

En la jaro 1933. estis fondita "Laborista Esperanto Societo" (LES). La membroj kaj estraranoj de la societo estis Vjekoslav Premuž, Tomo Dutković, Stjepan Feher, Oto Kajba kaj aliaj. La societo agadis en tre malfacilaj kondiĉoj de la reĝa diktaturo. La societo organizis kulturartajn programojn (aranĝojn, prelegojn, kursojn). Vjekoslav Premuž, lignaĵisto, unu el la plej aktivaj membroj, iniciatis en la jaro 1935 dulingvan monatan revuon "Naprijed - Antaŭen". Ĝi estis revuo por propagando de Esperanto, kiu aperadis ĝis la jaro 1938 kaj denove post la milito en la jaroj 1946 kaj 1947. En la jaro 1936 estis elektita nova estraro de la societo: Tomo Šegović, prezidanto, Oto Kajba, vicprezidanto, Vjekoslav Premuž, sekretario, Marija Višt, kasistino kaj bibliotekistino, kaj Zdenko

montgrimanta societo "Jankovac" (A. Cesarca 1) kaj ekde 1980 en la Studenta Centro (Istarska bb). Post la Patruja milito ĝi havis sidejon en K. Firingera 3 kaj nun la adreso estas Vijenac I. Meštrovića 26f.

"Liberiga Stelo" havis pli aktivajn kaj ankaŭ malpli aktivajn periodojn. Pli aktiva estis la periodo 1954-1955. La prezidanto en tiu periodo estis la profesoro Josip Velebit, elstara kroata tradukisto (la germana kaj Esperanto), esperanta poeto kaj recenzisto. Li realigis esperantajn kursojn en Radio Osijek. Oni en tiu tempo organizis dancvesperojn kaj kursojn por urbanoj. En la jaro 1955 la societo eldonas 4-an poŝeldonon de populara Esperanto-vortaro "4000 vortoj".

En 1957 Esperanto-ligo de Kroatio oficialigis la urbon Osijek kiel centron de la movado en Slavonio. Oni organizis kursojn en lernejoj kaj por tiu celo estis kapablitaj 7 instruistoj. Antun Tačković gvidas kurson en Industria Lernejo, Vojislav Borovac en la elementa lernejo "I. G. Kovačić" kaj en Instruista Lernejo, kun helpo de Jelena Sonnenfeld. En pluraj slavoniaj urboj oni organizas propagandajn prelegojn. La agado kulminas fine de la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento.

LA SUDA STELO

MONATA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN JUGOSLAVIO

JARO IV

Slavonski Brod, Majo 1935

Nr-o 4-5 (32-33)

Al Osijek!

Ĉiu socia fenomeno estas produkto de iu difinita socia medio, kiu, finfine, ĉiam formiĝas kiel rezulto de materiaj cirkonstancoj ĝenerale kaj ekonomiaj rilatoj aparte, en kiuj vivas la koncerna socio. Ankaŭ la lingvo, do, kiel unu el sociaj fenomenoj ek-estas, evoluas kaj malaperas sub la influo de tiuj ĉi faktoroj. akompanante ombre la

tiu ĉi bezono. Sama, aŭ eble pli granda parto, eĉ sentante la bezonon de internacia lingvo, entute ne scias, ke ekzistas solvo por ĝi. Kaj, fine, multaj tro multaj — eĉ aŭdinte ion pri esperanto — havas pri ĝi tre nebulan koncepton. Sekve ili estas ankoraŭ malfidemaj!

Parolante pri la esperanta movado, prave diras iuloke E. Drezen ke esperanto progresis iom post iom same, kiel normale progresas iu ajn planto plantita, sed speciale ne zorĝata.

Ĉefartikolo en "La Suda Stelo" (1935) verkita de Ivo Lapenna, kiu invitas esperantistojn al Osijek

Klinovski, Stanko Simović kaj Stjepan Antoš, membroj. La ŝtato malpermesis la societon kaj forprenis ĝian havaĵon en 1938, pro komunista influo, kiun faris almenaŭ kelkaj el la gvidantoj.

Post la dua mondmilito en la jaro 1946 estis fondita Esperanto societo "Nova Espero". Prezidanto de la societo estis Franjo Smerdel kaj la sekretario Vjekoslav Premuž. En tiu tempo aperis dumonata gazeto "Antaŭen - Napred" kaj dimanĉe Radio Osijek havis elsendon por esperantistoj. En 1947 tiama "Napred - Antaŭen - Esperanto" kun "Suda Stelo" kaj "Triglavo" transformiĝas en novan periodaĵon "Jugoslavia Esperanto Gazeto". La ĉefa kaj respondeca redaktoro de la nova revuo estis Vjekoslav Premuž. La societo ĉesas sian laboron en la jaro 1948.

Pri la Laborista Esperanto Societo "Srđan Petrov" oni ne scias multe. Oni ne scias, ĉu ĝi estis memstara societo aŭ sekcio de kulturarta societo de fervojistoj "Srđan Petrov". La agado de la societo similis al tiu de antaŭmilita LES. La ejo de la societo estis laborejo de Vjekoslav Premuž, sekretario de la societo. La societo ĉesis la agadon en la jaro 1960, kiam la sekretario malsaniĝis.

La 17-an de septembro 1950 fondiĝis Esperanto societo "Liberiga Stelo", kiu senĉese agadas ankoraŭ nun. En la estraro estis: Franjo Špehar, prezidanto, Ivan Špoljarić, vicprezidanto, Vjekoslav Premuž, sekretario, Ivan Fridrih, kasisto, Drago Žufa, librotenisto, kaj Oto Kajba, Antun Šebetić kaj Georg Tomljenović, membroj. Ĝis la jaro 1967 la sidejo de la societo estis en Bulevar JNA 37, poste ĝi translokiĝis en la ejon de la

Post tiu ora periodo venas krizo. La sekretario Franjo Smerdel, kvankam malsana, faras grandajn klopodojn por revivigi la movadon. En 1967 la societo perdas la ejon en Bulevar JNA 37 kaj en 1971 mortas Franjo Smerdel. Tio profundigas la krizon de la societo. La societo vigliĝas en 1976 kiam oni festas datrevenon de Esperanto en Osijek. En la jaro 1979 en la societon venis junaj kaj aktivaj membroj, inter ili prof. Ivan Flanjak. La societo de tiam pli kaj pli aktivis kaj la movado progresas.

En la jaro 1976 la rekonon de Jugoslavia Esperanto Ligo ricevis jenaj membroj de "Liberiga Stelo": Lavoslav Kraus, Stjepan Feher, Antun Šebetić, Pantelija Popović, Vojislav Borovac, Aleksandar Kocian, d-ro Božo Sabljčić, Juraj Medved, Zlatko Lončarić, Maja Vukmanović kaj Marijan Kekez.

Osijekaj esperantistoj en tiu tempo kunlaboras kun esperantistoj el hungara urbo Pécs. Oni presadis propagandan materialon, eldonadis la societatan bultenon "Os-Infornilo" kaj en 1980 eldonis la okan eldonon de la vortaro "4000 vortoj".

Baldaŭ la societo komencis kontribui al la kultura vivo de la urbo per kursoj por komencantoj kaj progresintoj, fakaj seminarioj, vespero de la japana kulturo, 2-a Renkontiĝo de Esperantistoj de Slavonio kaj Baranja, Tago de la malta kulturo, Tagoj de Esperantistoj el Pécs, Internacia memorkunveno "Ivan Flanjak" (omaĝe al la frue forpasinta tre aktiva membro de la societo), la simpozio "Ĵurnalismo kaj literatura kreado en Esperanto". "Liberiga Stelo" fariĝis unu el la plej aktivaj Esperantaj societoj en Jugoslavio. En 1983 estis eldonita libro

pri historio de la Esperanto-movado en Osijek sub la titolo "Obstine antaŭen" kaj en 1984 "Novaj perspektivoj". Membroj de la societo Antun Šimunić kaj Aleksandar Kocian ricevis rekonon de JEL. Bedaŭrinde, krom la forpasintan profesoron I. Flanjak, la societo baldaŭ perdas ankoraŭ unu tre aktivan kaj kapablan membron: Nikola Knežević. Tamen, novaj kursoj en elementaj lernejoj, mezlernejo "Braća Ribar", Pedagogia kaj Jura fakultatoj kaj Studenta Centro venigas novajn freŝajn fortojn (prof. Julija Rusić, prof. Blaženka Homa, prof. Višnja Branković, Vesna kaj Nevenka Šaponja, Mirta Godec, Željko Vurm kaj aliaj.

En 1984 la societo festis 95-an datrevenon de Esperanto en la urbo. La estraron en tiu tempo faris Antun Šimunić, prezidanto, Mirta Godec, vicprezidanto, Aleksandar Kocian, sekretario, Nevenka Šaponja, kasistino, kaj ing. Zlatko Lončarić, Mile Krajina kaj prof. Julija Rusić, membroj.

Post la Patruja milito la societo daŭrigis la aktivadon en novaj ejoj. En 1993 mortis prof. A. Šimunić (kiu en tiu tempo ne plu loĝis en Osijek). En 1999 en Osijek okazis 3-a Kongreso de kroataj esperantistoj. En 2001 en Osijek okazis 13-a Internacia medicinista Esperanto-konferenco. Oni eldonis plurajn librojn: "Esperantski mozaik" (2 eldonoj), "Rakontoj sub la lito" kaj "Triopo Terura" (infanlibroj), "Haltigitaj memoroj" (rakontoj) kaj "Osijek 1889 - Prvi esperantisti u Hrvatskoj".

Ni menciŭ ĉiujn prezidantojn de la societo: Franjo Špehar (la unua!), Ivan Mikš, ing. Mirko Polonijo, prof. Josip Velebit (1954/55), Pantelija Popović, d-ro Atif Maglajlić, Aleksandar Kocian, Stjepan Feher, Stipe Jurčević (1978/79), Petar Pazaver (1980/81), Mirko Vidaković (1982), mag. Antun Šimunić (1983/84, 1990), Višnja Branković (1985/6), Danijela Poropat (1987-?), Zlatko Lončarić (?-1999), Davor Klobučar (1999-2004), Hrvoje Sandukčić (2004-6), Danijela Drakula (2006-7) kaj hodiaŭ denove Davor Klobučar.

Inter 1978 kaj 1980 en Osijek ekzistas Esperanto-societo "Osijek". Prezidanto de la societo estis Josip Karadža, vicprezidanto Rajko Kolundžić kaj sekretario Želimir Pehar.

En la jaro 1979 estis fondita Klubo de osijekaj studentoj esperantistoj (KOSE). La celo de la klubo estis popularigi Esperanton inter studentoj. Post komenca entuziasmo la agado stagnas, sed revigliĝas en la jaro 1983, kiam la klubo ŝanĝas la nomon al Klubo de osijekaj studentoj esperantistoj "Ivan Flanjak". La prezidantino estis Blaženka

Esperanto-societo "Liberiga Stelo" en 1950-aj jaroj.



Homa, Luca Babić estis sekretiino kaj Damir Malkoĉ kasisto. En 1984 la prezidantaro konsistas el Hrvoje Vincetić, prezidanto, Luca Babić, sekretiino, kaj Spomenka Marić, kasistino. En la klubo aktivas ankaŭ Damir Malkoĉ, Snježana Skroban, Sandra Ileš, Atila Rusić, Igor Ilić, Snježana Gavran, Suzana Berdalović, Gordana David, Ante Tomas kaj aliaj. La klubo organizis plurajn esperantajn kursojn, ĉefe por mezlernejanoj kaj studentoj. La klubo

havis bonan kunlaboron kun Esperanto-societo "Liberiga Stelo". Internacie KOSE havis tre bonan kunlaboron kun "Pola Studenta Esperanto Komitato" (PSEK) kaj interŝanĝis vizitojn kun tiu asocio. La klubo ne plu ekzistas.

Ni menciŭ ankaŭ, ke post la fondiĝo de KOSE estis fondita Komunuma konferenco de KEL, kun la celo kunordigi agadon de la du societoj, kaj reprezenti la movadon antaŭ la tiama komunumo Osijek.

Damir Malkoĉ □



Tria Kongreso de kroataj esperantistoj en Osijek en la jaro 1999

ALDONO REDAKTORA:

Post la Patruja milito ekzistas nur Esperanto-societo "Liberiga Stelo", kiu stagnis kaj havis tre malmultajn aktivajn membrojn, eĉ ne klubejon, ĝis la jaro 1998, kiam la prezidanto Zlatko Lončarić sukcesis, ke la urbo permesu al la societo senpage uzi ejon en Tvrđa. Tiam estis organizita kurso kiu daŭris 4 semajnfinojn. Komence estis 32 lernantoj kaj la diplomon akiris 9. Inter ili estis Ivana Žagar kaj Hrvoje Sandukčić, kiuj plurajn jarojn aktivis en la societo, kaj gvidis po kelkajn kursojn. Bedaŭrinde, pro malkresko de publika intereso pri Esperanto, kursoj ĉesis. La membraro ne juniĝas, restis nur antaŭmilitaj esperantistoj, fakte parto de ili. Malmultaj vizitas la klubejon, kaj eĉ ilia entuziasmo jam malkreskas. Necesas fari novajn kursojn, altiri lernantojn kaj el ili eduki novajn idealistojn. Ĉu tio eblos? Se ne, tiam povus malaperi la longa kaj glora esperanta movado en nia urbo...

OSIJEKA KVINOPO EL 1889 - LA UNUAJ ESPERANTISTOJ EN KROATIO

En tiu ĉi teksto temas pri la unuaj homoj, kiuj okupiĝis pri Esperanto en la teritorio de la hodiaŭa Kroatio. Ili anonciĝis en 1889, kaj tiam ili vivis ĉiuj en la urbo Osijek. Tamen, eĉ hodiaŭ malmultaj homoj scias, ke Esperanto aperis en Osijek pli frue ol en Zagreb kaj Rijeka. Eĉ 20 jarojn pli frue! Ne temas pri esperantaj organizaĵoj aŭ publika esperanta agado, sed ekzistis unuopuloj, kiuj lernis la lingvon. Ili estis la unuaj ne nur en Kroatio, sed ankaŭ en la eksa Jugoslavio, kaj eĉ en la sudorienta Eŭropo!

Kroatio estis tiam parto de Aŭstro-Hungario, lando en kiu vivis multnombraj popoloj. Nur du inter ili estis regantaj: aŭstroj kaj hungaroj. La ŝtato, kvankam regata de aŭstria imperiestro, estis interne dividita al du partoj (la aŭstria kaj la hungara). Kroatio havis certan aŭtonomion kaj apartenis ĉefe al la hungara parto. Osijek, la urbo en nordorienta Kroatio sur la rivero Drava, estis tiam moderna kaj grava industria urbo, preskaŭ same granda kiel la kroata ĉefurbo Zagreb. Multaj homoj el aliaj regionoj kaj popoloj migris al Osijek, sed la plimulto estis kroata. Kvankam la germana lingvo kaj kulturo estis pli elstara, la kroata elemento iom post iom kreskis.

Esperanto aperis en la jaro 1887, kiam Zamenhof en Varsovio publikigis lernolibron en la rusa lingvo. Varsovio tiam estis en Rusio. En la komenca periodo (1887-1889) esperantistoj ĉefe komunikis letere, sed malmultaj konis sin reciproke. Tial por firmigo de la movado tre gravis la unua gazeto "La Esperantisto", aperinta en 1889.

Sed ankaŭ grava, speciale por mia esploro, estas la unua monda adresaro de esperantistoj (nomita "Adresaro de la personoj kiuj ellernis la lingvon "Esperanto"), kun adresoj kolektitaj inter 1887 kaj 1889. Tie Zamenhof listigis alfabeto 1.000 nomojn kun adresoj. Tre utila paŝo, ĉar finfine esperantistoj havis eblecon starigi rektajn kontaktojn reciproke! Tie estis 919 nomoj el Rusio (la lando kie la lingvo ekestis!) kaj nur 81 el aliaj landoj. Inter ili estis eĉ 5 personoj el Osijek! Konsideru la nombrojn: el 81 ne-rusiaj homoj eĉ 5 estis el Osijek!

Tiun grupon mi nomas "Osijeka Kvinopo" (Osječka petorka). Ilan ekziston menciis en 1913 la polo Adam Zakrzewski en sia "Historio de Esperanto 1887-1912", sed neniu priatentis tiun



*Ema Hradil (?) i Augusta Hradil
ĉ. 1890*

informon. Nur en 1979, post represo de lia libro, tiun informon rimarkis la serba esperantisto Boriša Miličević. Li akiris fotokopiojn de ĉiuj zamenhofaj adresaroj el Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, detale ilin tralegis kaj trovis la kvinopon! Eĉ tiu simpla laboro estis granda: temas

ja pri 29 adresaroj kun 21.916 nomoj (minus 3 adresaroj, kiujn la muzeo tiam ne havis). Tiam reagis la profesoro Ŝimunić el Osijek, esploris la aferon surloke kaj la rezultojn metis en siajn 2 librojn pri la historio de Esperanto en Osijek ("Obstine Antaŭen", 1983, kaj "Novaj Perspektivoj", 1984). Li trovis nur bazajn faktojn, tamen ne pri ĉiuj 5 personoj, kaj ne sen eraroj. "Obstine Antaŭen" estis konata nur en Osijek, kaj "Novaj Perspektivoj" nenie!

En 2007 mi komprenis, ke la afero estas tre signifa, kaj ke urĝas esplori ĝin, ĉar baldaŭ malaperos la lastaj spuroj. Kaj ke tion fari povas nur iu, kiu vivas en Osijek. De post tiam mi jam du jarojn serioze kaj pasie esploras tiujn biografiojn, studante ĉiun spuron en Osijek, kaj ankaŭ korespondante kun arkivoj kaj unuopuloj el Kroatio, Slovenio, Aŭstrio, Italio, Germanio, Bosnio, Rumanio ktp. Aperis multaj novaj faktoj, sed eĉ nun restas iuj nepre esplorindaj.

Kaj kiuj homoj estas en la Kvinopo? Estas 5 virinoj! Pli precize 5 junaj fraŭlinoj: fratinoj Hradil (Ana, Augusta kaj Ema), Pilepić Marija kaj Hergović Natalija, kun respektivaj aĝoj en 1889: 24, 21, 18, 18 kaj 18. Ili loĝis en la osijeka parto Mal-supra Urbo (Donji grad) en distanco de maksimume 200 metroj. Ili certe agis en



*Ana (Hradil) Krvarić, Augusta (Hradil) Dierich kaj staranta (?)
Ema (Hradil)*

konsento kaj lernis preskaŭ certe el unusola lernolibro, kredeble germanlingva. Ili certe anoncis sin al Zamenhof sendinte la kuponojn, kiuj estis en la Unua Libro. Ni ne scias precize, ĉu en 1888 aŭ en 1889 ili lernis. Tre supozeble ili varbis pliajn amikinojn, nur sensukcese. Post 7 jaroj aperis eĉ “la sesa homo” el Osijek, la leŭtenanto Mosche Egon. Kaj post li en Kroatio nenio esperanta okazis ĝis la periodo 1906-1908, laŭ nia scio.

En 2007 mi verkis pri la Kvinopo interesan libreton “Osijek 1889 - Prvi esperantisti u Hrvatskoj”. Mendebila ĉe Grafokom el Đurđevac. Sed aperis novas malkovroj, kaj en 2009 espereble sekvos mia nova kaj granda libro, kun pli da detaloj, kiu verŝajne nomiĝos “Kvin petaloj el Osijek”. Nun mi prezentu koncize la Kvinopon!

Carolus (Karl ?) Hradil, vaporŝipa oficisto (naskita en Znojmo, Ĉeĥio) venis al Osijek, edziĝis tie en 1864 al Maria Fiedler, kaj havis 5 filinojn. Dum la infanaĝo mortis du filinoj, kaj ankaŭ la edzino. Li reedziĝis al sia bofratino Berta, ricevis filon Karl (Dragutin), kaj baldaŭ mortis. Post kelkaj jaroj mortis ankaŭ Berta, kaj restis nur tiuj 3 orfaj fratinoj el la adresaro kaj ilia duonfrato. Lin mi mencias tial, ke mi parolis kun lia (en 2007 vivanta) filino Maja Zorenić, kiu rememoris la vortojn de sia patro, ke liaj fratinoj iel okupiĝis pri Esperanto.

Ana (naskita 1865) edziniĝis en 1890 en Osijek al Viktor Krvarić, ŝtata oficisto, kiu postenis en Bosnio, kaj post lia emeritiĝo la geedzoj revenis al Osijek en 1921. Viktor mortis en 1927 kaj Ana en 1948. La sola infano estis la filo Kamilo, kiu pro politika agado en Sendependa Ŝtato Kroatio (NDH, 1941-1945) devis elmigri al Argentino, kie li mortis kun sia edzino Emilija Munk, sen idoj.

Augusta (naskita 1868) edziniĝis en 1903 en Mohacs (Hungario) al la osijekano Antun Dierich, kiu ankaŭ estis ŝipkapitano kaj poste privata oficisto. Ili ankaŭ iam revenis al Osijek, kie Antun mortis en 1937 kaj Augusta en 1947. Ilia sola ido, la filo Aleksandar, pereis en la 2a mondomilito en batalo en Bosnio. Li havis nek edzinon nek idojn. La tombo de Augusta en Osijek (kaj laŭdire la sama de Ana) ekzistis ĝis ĉ. 1975.

Ema, la plej juna (naskita 1871), edziniĝis en Osijek en 1891 al Teodor Popović, ŝtata oficisto kaj verŝajne kolego de Viktor Krvarić. Teodor estis filo de ortodoksa pastro, sed oni povas legi, ke li estis katoliko. S-rino Zorenić ne scias, ke Ema entute ekzistis, kvankam ŝi (kiel eta knabino) iomete konis Ana-n kaj Augusta-n.

Pri Natalija Hergović skribis Ŝimunić multe, sed ĉio estas erara (ekz. ŝia naskiĝjaro, ŝia juda deveno ktp). Nome, li akceptis senkritike asertojn de unusola atestanto, osijekano Ivan Hergović (nun forpasinta; ankaŭ Ŝimunić). Mi kontrolis ĉie en dokumentoj, kaj eĉ ne unu fakton mi povis konfirmi! Kaj estis ĉiam pli

klare, ke tiu homo ne povas esti parenco de Natalija. Finfine aliaj familianoj klarigis, ke li ŝatis troigi kaj elpensadi faktojn. Do mi revenis al nulo. Sed poste mi trovis jarraportojn de osijekaj lernejoj el 1880-aj jaroj, kaj komprenis, ke Natalija devis esti naskita en 1871 kaj veninta al Osijek en 1881. La familio ne menciigas en aliaj dokumentoj post 1890, do ili forlasis la urbon. Kien? Kiu estis la patro? Ĉu ŝi poste havis edzon kaj idojn? Mi esploris freneze, eĉ en lokaj tagaj gazetoj mi provis hazarde malkovri tiun familion, sed vane. Intuicio diras, ke ankaŭ ŝia patro laboris por la vaporŝipa kompanio. Sed la mistero restas.

Pilepić Eduard (1833, Praputnjak -1898, Osijek) estis vaporŝipa kapitano sur Danubo. Li en 1869 edziĝis en Braila (Rumanio) al Teresia Frollo (naskita 1849 en Venecio). Marija Pilepić naskiĝis en 1871 en Tahitotfalu en Hungario. Ŝi havis poste 2 fratojn, Karlo kaj Hinko. Parton de la infanaĝo ili pasigis en Rumanio en pluraj urboj (Turnu Severin kaj supozeble Bukureŝto). En 1882 la familio venis al Osijek. Iom post la morto de Eduard (1898), la familio disiĝis. Karlo edziĝis kaj havis edzinon, filinon kaj fabrikon en Germanio, Hinko venis al Sarajevo en 1905, kiel bankoficisto kaj poste direktoro. Teresia kaj Marija vivis certan tempon en Trento (Italio). Maria neniam edziniĝis. Ŝi vivis poste kun la frato Hinko en Sarajevo, kaj poste kun Karlo en Beograd, Zagreb (ekde 1948) kaj fine en Opatija, kie ŝi mortis en 1962. Karlo mortis en 1971 en Rijeka, lia sola nepo en Germanio donis al mi la solan restintan foton de Marija! Tri idoj de Hinko ankoraŭ vivas en Sarajevo kaj unu en Velika Gorica. Du filinoj bone memoras pri Marija. Bedaŭrinde dum la milito en Sarajevo, en 1992 trafita per serba grenado, forbrulis loĝejo de la tria filino, kun ĉiuj ekzistantaj dokumentoj kaj fotoj rilataj al Marija, inkluzive desegnaĵojn (laŭdire belajn), kiujn Marija faris!

Mi havas tre akcepteblan teorion, ke Marija Pilepić estis la ĉefo de la Kvinopo, do ke precize ŝi estis la unua esperantisto en Kroatio! Sekvas klarigo. En la adresaro 1889 aperis unusola nomo el Rumanio: tiu de Marta (Marietta) Frollo el Bukureŝto. Ŝia patro estis Frollo Gian Luigi, itala lingvisto naskita 1832 en Venecio, kiu vivis kaj mortis en Rumanio. Li havis kontaktojn kun eŭropaj lingvistoj, ekzemple kun Hugo Schuhardt, kiu okupiĝis iom ankaŭ pri volapuko. Kaj tiu Frollo certe estis parenco, eble eĉ frato de Frollo Teresia, la patrino de Marija Pilepić. Kiel alie klarigi, ke du personoj kun tia rara familia nomo (Gian Luigi kaj Teresia), naskitaj ambaŭ en Venecio, vivis ambaŭ en 1869 en Braila kaj poste havis po unu filinon kun la nomo Maria? Kaj ambaŭ junulinoj estis en siaj landoj esperantaj pioniroj el la zamenhofa adresaro!

La rumana Maria (Marta) eĉ verkis etan esperantan vortaron por ru-

manoj (publikigis Zamenhof en 1889, tre verŝajne en la formo de simpla faldfolio), sed rumanaj samideanoj scias pri ŝi preskaŭ nenion. Kaj preskaŭ certe estas, ke ĝuste ŝi entuziasmigis la kroatan parencon! Kaj ne inverse! Nia Marija Pilepić poste agis inter siaj samaĝulinoj Natalija Hergović kaj Ema Hradil. Kaj poste Ema varbis siajn du fratinojn. Por akiri esperantan lernolibron tiutempe, eĉ nur por scii pri ĝia ekzisto, necesis bonaj rilatoj kun kleraj homoj en eksterlando, kion Marija Pilepić havis, kaj la fratinoj



Hradil certe ne. Ili estis orfoj el simpla loka familio, senĉese batalanta kontraŭ problemoj (malsanoj, mortoj, malriĉo ktp).

Do, Marija Pilepić estis la unua kroata esperantisto! Ŝi rajtas diri “kroata”, kaj ne nur “kroatia”, ĉar la patro estis kroato, kaj ŝi mem deklaris sin tia en unu dokumento el novembro 1944 (kiam ŝi anoncis ĉe policejo sian loĝadon en Beograd). Ŝi estis la motoro de la Kvinopo. Kaj kiam “la sesa homo” Mosche Egon servis en Osijek kiel leŭtenanto (1894-1898), ŝi la sola el la Kvinopo vivis tie. Kaj ambaŭ en Malsupra Urbo. Estas tre forta la supozo, ke ĝuste ŝi varbis lin por Esperanto! Krome, unu nepino memoras, ke Marija sukcese varbis sian lingve talentitan fraton (Hinko) en liaj lastaj jaroj. Cetere, pri Egon, aŭ oficiale Eugen, mi esploras plu. Nun mi malkaŝas nur, ke li naskiĝis en 1873 en Ljubljana, kiel filo de la fama advokato Mosche Alfons, jam en 1874 mortis lia patrino Ana Grumnik (Grundner), li havis poste duonfraton Erich kaj duonfratinon Vera. En 1898 li forlasis la armeon, elmigris al Sudafriko, volontulis en anglo-bura milito kontraŭ angloj, kaj en 1900 revenis al Aŭstrio. Li parolis plurajn lingvojn, ankaŭ slovene. Tamen ŝajnas, ke li ne estis sloveno, sed aŭstrianano. Kaj en Osijek li vivis nur 4 jarojn...

Sciante kien la vivo kondukis la osijekaninojn, mi provas trovi eblan influon de ili al postaj esperantistoj, kiuj aperis en la regiono, kaj malrekte eĉ al

tiuj el 1908! Estas ja kelkaj en postaj zamenhofaj adresaroj. Sed malgraŭ kelkaj esperoj, ŝajnas ĉiam pli, ke tio ne okazis. Se ni konsideras grandan esperantan krizon post 1894 eĉ en la movada centro (tiam Rusio kaj meza Eŭropo), ne estas mirinde, ke en la rando de la movado (Kroatio kaj sudorienta Eŭropo) tute sekiĝis la unua ondo de la entuziasmo el 1889. Tamen, la rakonto pri osijekaj junulinoj restos ĉiam interesa kaj plaĉa, kaj osijekanoj fieros!

Do, mi resumu miajn konojn pri la Kvinopo. La tri fratinoj Hradil naskiĝis en Osijek (en la urboparto Tvrđa, kaj poste translokiĝis al Malsupra Urbo). Marija naskiĝis en hungaria vilaĝo apud Danubo. Natalija naskiĝis en nekonata loko, sed ekster Osijek. Inter 1881 kaj 1890 ĉiuj kvin certe vivis en Osijek. Ĝis 1895 ĉiuj forlasis la urbon, krom Marija, kiu faris tion post 1898, kaj certe ĝis 1905. Kaj sekvis 20 jaroj, ĝis kiam 2 membroj de la Kvinopo revenis: Ana kaj Augusta kun la edzoj. Kaj post la reveno, ili vivis ankoraŭ ĉ. 20 jarojn kaj mortis en Osijek. Mi parolis kun personoj, kiuj konis vivantan Ana-n (1 persono), Augusta-n (2 personoj) kaj Marija-n (3)! Fotojn mi trovis nur de Ana, Augusta, Marija kaj eble Ema. La domoj, en kiuj la esperantistinoj naskiĝis, ne estas al mi konataj. La domon el 1889 mi trovis nur por Marija Pilepić (hodiaŭ la adreso Crkvena 17 en Osijek). La domo, en kiu Ana mortis, estas konata (Zadarska 5 en Osijek), sed ĝi en 2008 estas detruita. Augusta mortis en Osijek,

Sunĉana 3, kaj tiu domo (fakte unu loĝejo en ĝi) ankoraŭ ekzistas en 2008. Ankaŭ estas konata la domo, kie mortis Marija Pilepić: temas pri la ankoraŭ ekzistanta Vila Marijana en Opatija. La tombo de Augusta (kaj verŝajne la sama de Ana) estas konata, sed ekde 1975 ne plu ekzistas (la tombejo Sveta Ana en Osijek). Tre grave estas diri, ke la tombo de Marija Pilepić ankoraŭ ekzistas en Opatija. Ĉar delonge neniu pagis por la tenado, minacis la danĝero, ke la tombo ne plu ekzistos. Sed Esperanto-Societo Rijeka sukcesis en 2008, ke Marija, kiel la unua esperantisto ĉe ni, eniru la liston de elstaraj lokaj personoj, pri kies tomboj garantias la urbo Opatija! Sekve estas nova Esperanto-objekto en Kroatio, kaj rijekanoj fieras, ke tio estos la kvina ZEO en ilia regiono!

Ĉu estas eblecoj, ke en estonta tempo ni trovu pli da informoj pri la Kvinopo? Generale dirite, ĉio estas ebla. Sed dum mia esplorado mi konkludis, ke nura blinda hazardo ne helpas. Oni devas precize scii, laŭ kiu spuro iri. Mi ĉi tie volas rekomendi kelkajn spurojn, por eventuala posta esplorado. Ema Hradil tre verŝajne post 1891 certan tempon vivis en Jajce (Bosnio). Hodiaŭ la ekleziaj lĵbroj estas en la tiea franciskana monaĥejo, sed pro ĝia rekonstruo ili ne estos uzeblaj dum kelkaj jaroj. Se Ema restis tie longan tempon, eble ni trovos informojn pri naskiĝoj kaj mortoj en ŝia familio. Pri Natalija Hergović estas supozo, ke ŝia patro laboris en grandega aŭstria vaporŝipa

kompanio DDSG, sed iliaj arkivoj estas grandparte perditaj. Tamen eventuale iam iu kolektos kaj ordigos la materialojn, kaj metos ilin al publika dispono. Mi interesiĝis ankaŭ pri certa Hergović Michael, kiu estis oficiro, kaj kies nomo ekzistas en aŭstria armeaj listoj (“Militär-Schematismus”) en 1860-aj jaroj, en la 6-a lim-garda regimento en Bjelovar, sed en postaj jaroj ne. Eble li forlasis la armeon kaj trovis alian postenon en Osijek? Ĉu li estas la ĝusta homo? Pri la fratinoj Hradil ĝenerale, ĉiuj eventuale savitaj leteroj kaj dokumentoj de Ana kaj Augusta troviĝas ĉe la profesorino Ljerka Perĉi, kiu vivas en Varaždin kaj Osijek, kaj okupiĝas pri diversaj historiaj esploroj. Kiam ŝi metos ilin al publika dispono, aŭ havos tempon por esplori mem, oni eble ekscios almenaŭ iomete pri Ana, Augusta kaj eble eĉ pri Ema. Koncerne la fruan (antaŭ-osijekan) vivon de Marija Pilepić kaj ŝia familio, oni serĉu en ŝtataj arkivoj en Turnu Severin kaj Bukureŝto, speciale rilata al bazaj lernejoj, kiujn gvidis la katolika eklezio. Kaj oni esploru ankaŭ la familion de la bukureŝta profesoro Gian Luigi Frollo. Eble en arkivoj de la itala urbo Trento oni trovos informojn pri restado de Marija tie. Kaj, se iu trovos nepojn de Ema aŭ Natalija, eble tiu trovos ĉe ili ankaŭ fotojn, leterojn aŭ taglibrojn rilate al la tuta Kvinopo! Kaj finfine, post jardekoj oni eble povos en Interreto simple trovi multon, kio hodiaŭ estas kaŝita kaj nekonata. Bonŝancon!

Davor Klobuĉar □



ŜERCOJ EL LA VERKO “KRUKO KAJ BANIKO EN BERVALIO”.

La verko de Louis Beaucaire estas bonega fonto de majstro-ŝercoj, se vi ne estas pruda...

Kiu aŭdis la unuan, aŭdu ankaŭ la duan

Baniko skribas leteron al Kruko, por klarigi al li, ke li ne povas inviti lin al sia edziĝo: -- Kara amiko, ĉar vi estis antaŭ du jaroj amoranto de mia fianĉino Rozita, vi facile komprenos, ke ne estus konvene ĉeesti la ceremonion, k.t.p. Kruko tuj prenas plumon, paperon kaj skribas: -- Responde al via cirkulero de la 3a de aprilo, k.t.p....

En sonĝo

Baniko konfidencas sian maltrankvilon al Kruko:

- De kelka tempo mia edzino laŭte krias ĉiunokte en sonĝoj: “Ne, Henriko, ne!”
- Tio ne estas grava.
- Mia antaŭnomo estas Filibuso.
- Mi asertas, ke tio ne estas grava tiom longe, dum ŝi ne krias: “Jes, Henriko, jes!”.

Lingvaj respondoj

Kruko pagis al sia filino monatan restadon en Grezijono, por ke ŝi perfektigu siajn lingvajn konojn. Post sia reveno ŝi deklaras gaje:

- Paĉjo, mi ne plu estas virgan.
- Fi! Hontu. Mi elspezis tiom da mono, kaj vi ankoraŭ ne kapablas korekte uzi la akuzativon.

Sekretoj de la marestaĵoj

Maristo konfesas al sia amikino, kiu sidas sur liaj genuoj:

- Mi tatuigis al mi submarŝipon sur la ventro. — Jes, mi jam sentas la periskopon.

LONGA HISTORIO DE LA “OSIJEKA VORTARO”

Simpla uzanto de iu vortaro malofte pensas pri tio, kiel efektive ekestis tiu libro, kiun li tenas en la mano. Historiistoj, male, esploras kaj komparas. Se iu libro aperis en 11 eldonoj, des pli grandas la intereso de historiisto. Al tiaj libroj certe apartenas la vortaro, kiun oni kutimas nomi “osijeka vortaro”.

Por la unua fojo ĝi aperis kiel “Esperanto kroata-serba vortaro por komencantoj kaj progresintoj”. Eldonis ĝin Eldona Rondo esperantista en Osijek kaj presis la konata osijeka presejo de Eugen Sekler en 1935. Sur la titolpaĝo ĝi havis la tekston “4000 vortoj” kaj konsistis el 80 paĝoj. Laŭ la kovrilpaĝa noto ĝi poste, ĝis la 8-a eldono nomiĝis “4000 vortoj”.

“Bibliografija međunarodnog jezika u Jugoslaviji” kaj “Bibliografio



de internacia lingvo en Jugoslavio. II” de Marinko Gjivoje notas, ke la 8 eldonoj aperis jene:

Unua eldono: 1935, 3000 ekz. Presis Eugen Sekler, Osijek; **Dua eldono:** 1952, 4000 ekz. Presis “Ŝtampa” Osijek; **Tria eldono:** 1953, 4000 ekz. Presis “Ŝtampa” Osijek; **Kvara eldono:** 1955, 3000 ekz. Presis “Ŝtampa” Osijek; **Kvina eldono:** 1958, 2000 ekz. Presis “Ŝtampa” Osijek; **Sesa eldono:** 1961, 3000 ekz. Presis “Slovo” Beli Manastir; **Sepa eldono:** 1965, 2000 ekz. Presejo nekonata; **Oka eldono:** 1980, 3000 ekz. Presis “Đakovotisak” Đakovo.

Post la 8-a eldono la vortaro ŝanĝis la titolon al “10.000 vortoj” kaj



La 8-a eldono de la vortaro el 1980

aperis:

Naŭa eldono: 1989, 1000 ekz. Presis “Priĵepis i umnoĝavanje” Đurđevac; **Deka eldono:** 1991, 500 ekz. Presis “Priĵepis i umnoĝavanje” Đurđevac; **Dek unua eldono:** 2004, 1000 ekz. Presis “Grafokom” Đurđevac.

Tamen, la rakonto pri tiu vortaro estas multe pli interesa ol tion montras la pura statistiko.

Ĝiaj aŭtoroj estis konataj



La 11-a eldono eldonita en 2004

osijekaj esperantistoj Lavoslav Kraus kaj Dragutin Wranka. Kraus (kuracisto, naskita en Osijek, la 9-an de januaro 1897, mortinta en Beograd, la 28-an de decembro 1984) estis deklarita kiel romkatoliko, kvankam laŭdevone li certe estis judo. Wranka (naskita en Osijek, la 30-an de septembro 1904, mortinta en Mendoza, Argentino, la 21-an de februaro 1980) estis romkatoliko, oficisto de grundoficejo. Pri Wranka bonvolu legi pli ampleksan ĉapitron en “Tempo” 4/2005, dum pri Kraus vidu biografion en “Biografia leksikono de kroataj esperantistoj” (2002). Kio do ligis tiujn du personojn? En 1935 okazis en Osijek la 8-a nacia Esperanto-kongreso, en kies LKK plene aktivis ankaŭ la du menciitaj esperantistoj. Gravus diri, ke ekde la komenco de 1930-aj jaroj, la regiono de Slavonio estis tre forta en esperanta senco, kaj ke Wranka kiel Cseh-metoda instruisto, estis la ĉefa persono kiu okupiĝis pri kursoj, dum Kraus pli multe aktivis en organiza kampo, interalie ankaŭ sur tutlanda nivelo. Do, la kunlaboro inter ili du estis per si mem komprenebla. El tiu perspektivo, kompreneblas ankaŭ, kial la unua eldono de la vortaro aperis ĝuste en 1935. En la jaro de la kongreso, evidente pligrandiĝis intereso pri Esperanto.

Tamen, la ideo pri la “osijeka vortaro” ne estis formita en 1935. Kvar jarojn antaŭ tio (en 1931) en la presejo de Vilim Buk en Slavonski Brod aperis “Ključ esperanta” (Esperanto-ŝlosilo) aŭtorita de Niko Bubalo kaj Dušan Maruzzi, kiuj estis aktivuloj de zagreba Sudslava Esperantista Ligo (fondita en 1922) kaj Sudslava Esperanto-Servo. Verŝajne pro tio ĉar la “ŝlosilo” estis malpli ampleksa kaj neuzebla por kursoj, Kraus kaj Wranka entreprenis eldonon de iom pli ampleksa vortareto. Aŭ eble la kaŭzo estas multe pli profunda. Nome, en 1931/1932 ekestis en la landa movado la t.n. “organiza problemo”, ĉar estis registritaj du Esperanto-Ligoj, unu en Zagrebo, la alia en Beogrado. La “organiza problemo” devis esti solvita en la 7-a landa kongreso en Koprivnica (1934), sed Maruzzi kiel reprezentanto de la Zagreba ligo ne volis veni al la kongreso pro la altrudita subskribo sur la interkonsenta dokumento tagon pli frue en Zagrebo. Pro ĝi li estis konsiderata kontraŭulo de la interkonsento kiu solvus la problemon. Samkongrese estis forte atakita Vilim Buk, kiu “privatigis” la ĝistiaman oficialan organon “La Suda Stelo”, kvankam sen lia engaĝiĝo “La